

Enhavo

- **anoncoj**

Vojaĝu al Paralela Universo; Media hits; Forpaso; Vojaĝu al UK per Esperanto-karavano; UEA planas aĉeti loĝejon por volontuloj en Roterdamo; Korespondi deziras; Senpaga rektmetoda kurso por *Android*-aparatoj; Traduku usonan klasikaĵon por Liro-2016

- **loke**

Worldwide Esperanto Exam at Stanford University

- **de la estraro**

Raportoj de la direktoroj kaj aliaj estraranoj de Esperanto-USA.

- **Simpla donaca kesteto el juglandoligno**

la amatora lignaĵisto - Daĉjo Rutan

Jen la unua artikolo en nova serio por amatoraj lignaĵistoj. La celo estas doni praktikajn konsilojn, kaj eble inspiri al vi novan temon por propra projekto. Eĉ se vi ne ŝatas konstrui aferojn, espereble vi ĝuos sekvi la projektojn de unua ekpenso ĝis praktika realiĝo.

- **Vojaĝoj en Esperantujo**

vojaĝe tra la mondo - Arlyn Kerr

Dum la lastaj kelkaj jaroj mi kaj mia edzo Les ŝatas vojaĝi en Esperantujo. Ni planas vojaĝojn laŭ eventoj, precipe en Eŭropo. En 2015 dum 19 semajnoj, ni ĉeestis ses eventojn: MeKaRo-n en Toronto, la skotan nacian kongreson, SES-on en Slovakujo, la UK-on en Lille, Francujo, familian semajnon en Greziljono, kaj la italan nacian kongreson.

- **Raportoj pri la Landa Kongreso en Miamio**

kongresaj raportoj

“Esperantaj Esperantistoj” ĝuis vivantan komunumon.

- **NASK: entute tre bona**

loke - Zerbie Hynson

Estis impone havi la faman Bertilo WENNERGREN kiel instruiston. Konata pro PMEG kaj ankaŭ pro muziko, li estas unu el la plej famaj homoj en la nuntempa Esperanta movado.

- **Vere en Esperantujo**

loke - Hanso Becklin

Nova esperantisto raportas pri siaj spertoj ĉe NASK en Raleigh, Norda Karolino.

- **Bordo**

senintenca esperantaĵo? - Ray Redd

Jen tre forta (kaj tre peza) bicikloseruro. Sed ŝajne ĝi funkcias nur apud maroj, lagoj, aŭ riveroj.



Vojaĝu al Paralela Universo

Paralela Universo estas unu-taga festo de Esperanto okazonta en diversaj lokoj tra Norda Ameriko. Ĝi okazos la 20-an de Aŭgusto.



La ideo estas doni al vi oportunon paroli Esperanton vizaĝ-al-vizaĝe, renkonti novajn amikojn, kaj fari ĝuindajn memorojn. La organizantoj klopodas aranĝi la lokojn tiel, ke partoprenantoj tra Nordameriko povos atingi ilin ene de kvar horoj. La eventoj daŭros de proksimume de la 12-a ptm ĝis la 8-a ptm, kaj inkluzivos tagmanĝon, grupan agadon, kaj vespermanĝon.

Oni organizas Paralelan Universon tra Google-grupo [<https://groups.google.com/forum/#!forum/paralela-universo>].

Por organizi eventon en via regiono, simple faru novan fadenon en la grupo kun la nomo de la loko en la titolo. Por aliĝi al jam organizita evento, afiŝu en la fadeno de tiu evento kaj helpu plani la tagordon.

Media hits

- Back in January, National Public Radio did a three-minute feature on American Chuck Smith, one of the founders of the popular Duolingo Esperanto course who now lives in Berlin. The text and audio of the piece are available on the NPR website: *Life In Berlin: Chuck Smith And Berlin's Esperanto Community* [<http://goo.gl/uglfDt>].
- *Harvard Magazine* did a feature in its Jan-Feb issue titled *Encouraging Esperanto* [<http://goo.gl/sOgzkRj>]. It features Esperanto-USA member and Harvard alum Ruth Keves-Cohen (known to many in Esperantujo as “Margo”), another founder of the Duolingo course. “For Keves-



Cohen, Esperanto is both a language and a community,” the author writes. “She hopes it continues to grow, because ‘it’s so much easier to learn than any other language and the payoff is huge.’”

- In July, *Time* magazine’s online edition published an article titled *The Serious History Behind Esperanto* [<http://goo.gl/QU5OsL>], using this year’s *Universala Kongreso* in Nitra as a starting point for introducing the history of the language. Author Erika Okrent is quoted, along with former UEA president Humphrey Tonkin.
- Starting in late August, a syndicated article titled *Parolas esperanton? Esperanto language still has appeal in Brazil* [<http://goo.gl/jXbmU1>] began appearing in newspapers around the country. Written for McClatchy publishing (one of the USA’s largest newspaper companies) the article describes the popularity of Esperanto in Rio de Janeiro, site of this year’s summer Olympic Games. In addition to presenting interviews with Brazilian Esperantists, the article also mentions *Esperanto-USA* and features a quote from member Charles Mays of Raleigh, North Carolina.

Forpasoj

Ni funebras kaj kondolencas pri la forpasoj de la jenaj membroj:

- Angelina TAREMI de Tempe, Arizono forpasis en Novembro de 2015.
- Arnold VICTOR de Novjorkurbo forpasis la 28-an de Junio. Jen nekrologo [<http://goo.gl/iAZghd>] (anglalingva).
- Reginald JADERSTROM de Havajo forpasis la 18-an de Julio. Jen nekrologo [<http://goo.gl/yIOsaS>] (anglalingva).

- Paul EDDY de Olympia, Vaŝingtonio forpasis la 23-an de Aŭgusto.

Vojaĝo al UK per Esperanto-karavano

Lastatempe alvenis al la redakcio la jena anonco de Sofiya SOSKINA:



Se vi planas partopreni la 102-an Universalan E-Kongreson en Seulo kaj ŝatus atingi ĝin per trajne tra Rusujo en Julio 2017, aliĝu al organizata du-semajna E-karavano, kiu komenciĝos en Moskvo. La karavanon organizas kaj akompanos spertaj rusujaj geesperantistoj (sub aŭspicio de REU kaj Seula E-Kulturcentro). Por informoj kaj aliĝoj, vizitu <http://www.esperanto-karavano.info> [<http://www.esperanto-karavano.info>] aŭ sendu retpoŝton al [<esperantokaravano@gmail.com>](mailto:esperantokaravano@gmail.com).

Resendis al ni la saman anoncon Arnold VICTOR, kiu ĵus lastatempe forpasis. Al ĝi li aldonis:

Mi mem faris similan vojaĝon de Moskvo al Ulan-Batoro por Tutazia kunveno. Estis ankaŭ tia vojaĝo al UK en Jokohamo, Japanujo, pri kiu Gerrit BERVELING verkis libron *Vojaĝimpresoj el Siberio kaj Japanio*, haveblan de libroservoj de Flandra Esperanto-Ligo [<http://www.esperanto.be>] kaj de UEA [<http://katalogo.uea.org>]. Mi forte rekomendas la spertecon kaj helpemon de la s-anino, kaj la vojo estas unika oportuno je la plej favora prezo por vojaĝemuloj.

Indas noti, ke Arnold rakontis pri sia vojaĝo en artikolo por n-ro 2010:6 de Usona Esperantisto.

UEA planas aĉeti loĝejon por volontuloj en Roterdamo

La Estraro de UEA planas aĉeti loĝejon kun pluraj dormoĉambroj por volontuloj en Roterdamo. Momente ne eblas akcepti volontulojn facile, ĉar

dormo-spaco en la Centra Oficejo estas tre limigita kaj hoteloj estas tre multekostaj. Tamen volontulaj laborfortoj sur la diversaj agadkampoj de UEA estas nepre bezonataj, kaj multaj junuloj, mezaĝuloj aŭ pensiuloj pretas labori volontule por UEA en Roterdamo dum kelksemajna aŭ kelkmonata periodo.



“Ni starigis nian Volontulan Servon jam en la sepdekaj jaroj, sed nun la havebleco de eŭropaj subvencioj ebligas ĝian plivastigon”, klarigas Mark FETTES, Prezidanto de UEA. “Nia Estraro vidas en tio multajn avantaĝojn. Volontuloj ne nur helpas en la realigo de plej diversaj laboroj, sed krome post spertiĝo povos pli efike labori por plifortigi la movadon en siaj hejmlukoj.”

Por financi la aĉeton de volontula loĝejo, la Estraro lanĉas tutmondan donackampanjon. “Ĉiuj kontribuoj, ĉu grandaj, ĉu etaj, estas bonvenaj”, diras Martin SCHÄFFER, Ĝenerala Sekretario de UEA. “Krome eblas pruntedoni monon al UEA je malgranda aŭ nenia interezo por helpi al la realigo de la projekto.”

La Estraro jam konfidis al teamo de oficistoj la taskon esplori pri taŭgaj loĝejoj en Roterdamo, sub la gvido de Vica Ĝenerala Direktoro Veronika POÓR.

Por ricevi pliajn informojn, skribu al [<domo@co.uea.org>](mailto:domo@co.uea.org). Donacojn eblas fari al la kontoj de UEA [<https://goo.gl/aiuE8b>]. (Bonvolu aldoni priskribon: *Konto voldom*).

Ankaŭ Esperanto-USA povas akcepti donacojn por plusendo al UEA. Por pagi per kredit-karto, PayPal aŭ ĉeko, iru al nia retbutiko [<https://goo.gl/p6yIGJ>]. Alternative, eblas sendi ĉekon al *Esperanto-USA, 1500 Park Ave STE 134, Emeryville CA 94608*. Bv. noti, ke tiaj donacoj ne estas impost-subtraheblaj en Usono.

Korespondi deziras

Mi estas Jack O'DELL, okdek-jaraĝa usonano. Mi neniam lernis nek deziras uzi komputilon. Mi amas skribi leterojn kaj kartojn. Intereso: religio, kulturo kaj ĉiutaga vivo de alilandaj popoloj.

**Jack O'DELL, 1301 104th Ave.
NE, Minneapolis MN 55434**



Senpaga rektmetoda kurso por Android-aparatoj

Internacia Esperanto-Instituto en Hago lanĉis novan aplikaĵon por lerni Esperanton per aparatoj kiuj uzas la operaciumon *Android* (ekz., poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj). Ĝi estas senpage elŝutebla en la retbutiko *Google Play* [<https://goo.gl/vC6fRn>], kaj ĉe la TTT-ejo <http://www.iei.nl/apo.htm> [<http://www.iei.nl/apo.htm>].



La enhavo estas bazita sur la tre konata Esperanto-kurso *Esperanto per rekta metodo* de Stano MARĈEK. Piet BUIJNSTERS, la programisto, uzis por ĝi la tre trafajn kaj instruajn desegnaĵojn de Linda MARĈEKOVA el la kursolibro. Kiam oni klakas aŭ tuŝas la tekstojn de la kurso, oni tuj povas aŭdi klaran prononcadon.

Traduku usonan klasikajon por Liro-2016

La redakcio de la gazeto *La Ondo de Esperanto* denove invitas vin al nia tradicia literatura konkurso *Liro*. Por la anglalingva fako de la konkurso ni proponas la novelon *An Occurrence at Owl Creek Bridge* de Ambrose BIERCE [<http://esperanto-ondo.ru/Liro16en.htm>].



Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina GORECKA (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la adreso <sezonoj@yahoo.com>.

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1-a de Decembro 2016.

Laŭreato ricevos diplomon kaj libropremion. La organizantoj ĝis la 1-a de Januaro 2020 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiita konkursaĵo en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike. Ĝi aperos ankaŭ en antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*. La kopirajto tamen restos ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj por libroforma eldono.

Bonŝancon!

— Halina GORECKA, sekretario de *Liro*

Worldwide Esperanto Exam at Stanford University

On June 4th, 2016, Stanford University hosted a local exam session of the Worldwide Esperanto Exam Day. The participants joined the ranks of more than 1500 Esperanto-speakers worldwide who have taken the Council of Europe's international foreign language exams (KER). These exams provide a certified language diploma, accepted officially throughout Europe, in one of three levels: basic, intermediate & advanced.



Since 2008, Esperanto-speakers in more than 60 countries have successfully passed the exam.

The KER exam is offered at three levels: B1 (basic), B2 (intermediate), and C1 (advanced). The KER web pages at [edukado.net \[http://edukado.net/ekzamenoj/ker\]](http://edukado.net/ekzamenoj/ker) offer a complete description of the exam, how it is graded, and the different material covered at each level.

If you are interested in participating in next year's Stanford University exam session, please contact <amanda_higley@yahoo.com> by April 1st, 2017.

— *Amanda HIGLEY*

NASK: entute tre bona

Zerbie HYNSON

Mia sperto ĉi-jare ĉe NASK estis entute tre bona. Mi vere ne havas ian ajn grandan plendon. Nia alveno ne estis tre bona komenco, estante malfrua je unu tago, sed tio estis pro persona afero kiu okazis ĉe mia familio, ne pro io ajn rilate al NASK. Alveninte, mi tuj saltis en lecionon.

Mi vere nur povas paroli pri la supranivelaj lecionoj, ĉar en tiuj mi estis, kaj pri la aliaj mi scias nur tiom, kiom mi aŭdis de aliaj homoj kaj preteraŭdis el la klasĉambroj. La lecionoj estis ĉiam interesaj, ofte kun diskutoj pri tiu aŭ alia gramatika punkto, pri kiu demandis iu studanto; mi klare memoras, kiam la instruisto montris al ni diagramon de necesejo el bildvortaro kaj petis al ni mem skribi la vortojn. Estis malfacile (sed ĝuste pro tio interese) ĉar tre

multaj homoj uzas Esperanton ne hejme.

Estis impone havi la faman Bertilo WENNERGREN kiel instruiston. Konata pro PMEG kaj ankaŭ pro muziko, li estas unu el la plej famaj homoj en la nuntempa Esperanta movado. Sed moviĝante de tiu temo, mi multe ĝuis ne nur la lecionojn, sed ankaŭ la posttagmezajn aktivajojn. Tiuj estis ĉefe prelegoj kaj muzikaj prezentoj, sed ankaŭ mi multe ĝuis iri en la urbon Raleigh por viziti la muzeojn de Natura Scienco kaj de Historio kaj, pli poste la saman tagon, la stratfeston kaj artfajraĵojn. Tra la tuta NASK sed en tiaj eventoj des pli estis vere mirinda etoso, memoriga pri parto de kial mi estas Esperantisto. Apenaŭ estis unu teda momento.

de la estraro

Ĉiunumere mi petos la estraranojn iomete verki por sciigi al vi, kion ili lastatempe faris. Ili mem decidas kiel plej bone fari tion: ĉu raporti pri agadoj, ĉu proponi aŭ diskuti ideojn, ĉu instigi membrojn al kunlaboro en diversaj projektoj, ktp.

Kaj ne forgesu: mi volas aŭdi ankaŭ *viajn* demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro — ĉu en Esperanto aŭ en la angla. Sendu mesaĝojn por nia *leterkesto* al la redakcio.

— *La redaktoro*

Elizabetho DORCAS, Direktoro

Dum la jaro, mi partoprenis en retaj kunsidoj de la estraranoj kaj aktiviĝis en nia loka klubo. Filipino kaj mi komuniĝis kun kelkaj novuloj kaj provizis stud-materialojn al iuj el ili. Mi telefonis al informpetantoj, kies numerojn ni ricevis de Vilĉjo HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo.



Charlotte BURTON, Direktoro

Ĉi-jare mi aktiviĝas en Esperantujo per partoprenado en la E-USA-estraro kaj nia loka klubo. Plue, mi publikigis studlibron pri Esperanto, *Beginning Esperanto Workbook* kiu vendiĝas per Lulu kaj Amazon. Mi uzas tion por helpi al komencantoj kaj mi parolas pri la lingvo al instruistoj kaj administrantoj ĉe loka lernejo.



Julie SPICKLER, Vicprezidanto

Kiam mi venis al Miami por la 64-a Landa Kongreso de Esperanto-USA, mi tre ĝojis, ĉar mi antaŭvidis la eblon reviziti kubajn amikojn kun kiuj mi unue renkontiĝis kaj amikiĝis dum aliaj Kongresoj en aliaj landoj: Meksiko, Kanado, kaj Kubo mem. La Kongreso en Miami estis historia evento, kaj ĝi estis kortuŝa por la usonanoj kaj kubanoj. La kubanoj

estis tri longtempaj movadanoj: s-ino Maritza GUTIERREZ, Alberto CALIENES, kaj Alberto RODRIGUEZ, kaj ankaŭ juna aktiva membro de KEA, Ismary LEZCANO GARCIA, kiu partoprenis NASK-on.

La Kongreso okazis sur la tereno de la Universitato de Miami kaj en la najbara hotelo *Holiday Inn*. La nombro de partoprenantoj ne estis la plej granda, sed la etoso estis ege varma kaj bonkora inter la pli-malpli 50 partoprenantoj. Aliaj partoprenantoj venis el multaj usonaj ŝtatoj: Florido, aliaj ŝtatoj de la oriento, mezo, kaj okcidento de Usono, kaj kelkaj venis el kanadaj provincoj. Maria MURPHY el Florido estris la Interkonatiĝan Vesperon, per petoj al la kongresanoj enkonduki sin kaj paroli iomete pri siaj vivoj: la rezulto estis bona interkonatiĝo kun niaj kunkongresanoj.

Dum la semajnfino ni spertis interesajn, amuzajn kaj informajn prelegojn kaj diskutojn fare de partoprenantoj kaj organizantoj. Dimanĉon vespere ni ĝuis bonegan bankedon en la belega kaj historia biblioteko de la Centro por Antaŭaj Studantoj. Ni manĝis bone, babilis amike, kantis kaj aŭdis muzikon kantitan de Chris NELSON; poste okazis tradicia aŭkcio, farita bone kaj amuze de George BAKER, kiu gajnis por E-USA proksimume \$200.



Ĉi-numere ne sendis raportojn:

- George BAKER, Kasisto
- Jarlo BILLS, Direktoro
- Taylor FRANCIS, Direktoro
- Lucy HARMON, Direktoro
- Chris NELSON, Sekretario
- Kelly NETTERVILLE, Direktoro
- Andrew ROSENBAUM, Direktoro

Simpla donaca kesteto el juglandoligno

Daĉjo RUTAN

Jen la unua artikolo en nova serio por amatoraj lignaĵistoj – homoj kiuj faras belajn kaj/aŭ utilajn lignaĵojn hejme, ofte sen helpo de multekostaj iloj. La celo estas doni praktikajn konsilojn, kaj eble inspiri al vi novan temon por propra projekto. Eĉ se vi ne ŝatas konstrui aferojn, mi esperas, ke vi ĝuos sekvi la projektojn en ĉiu artikolo de unua ekpenso ĝis praktika realiĝo. — *Red.*

Unu el la malmultaj donacoj, kiujn mia edzino deziris por sia naskiĝtaga datreveno, estis paro de orelingoj kun pendantaj krucoj. La butikisto, kiun ŝi proponis, ne havis tian varon, do mi aĉetis interrete. Kiam la donaco alvenis, mi malkovris ke ĝi estis sen donacujo. Do mi decidis fari taŭgan kesteton por ĝi.

Oni diras, ke konstruado de kestoj estas la plej granda parto de la lignaĵista metio, do eble ĝi estas bona temo por tiu ĉi unua artikolo!



Mi bezonis kesteton por enteni paron da orelingoj por mia edzino. Mi decidis fari ĝin el ligno de juglandarbo. Sur la pivotbla kovrilo mi konservis la naturan randon de la ligno por aldoni intereson kaj belecon.

Por fari tian kesteton mi preferas uzi malmolan lignon, ekzemple el kverko aŭ acero. Bedaŭrinde, en mia regiono oni kutime vendas nur krudajn tabulojn kaj trabojn el mola pino, kies ligno pli taŭgas por domkonstruado. Ĉe la plej grandaj vendejoj foje

troviĝas malgrandaj, pli fajnaj tabuloj el ruĝa aŭ blanka kverko, poplo, aŭ acero. Kaj por la plej seriozaj lignaĵistoj ekzistas vendistoj de multekostaj lignoj el malmolaj specioj kiel juglando – aŭ eĉ ekzotaj specioj kiel mahagono.

Alia eblo por amatora lignaĵisto estas reuzita ligno. Mi foje plenigas mian stokon de nepinaj lignoj per serĉo de vojflankoj dum mi veturas tien kaj reen. De tempo al tempo oni formetas meblojn por rubistoj. Ĉi-foje mi tamen havis branĉon de unu el miaj juglandarboj, kiun mi lastatempe pritondis, do mi decidis fari la kesteton el ĝi.

Unue, mi uzis tablosegilon por fari el ĝi latojn kun ortaj anguloj. Poste, mi mezuris kaj tranĉis la latojn por krei la pecojn de la estonta kesteto.

Jen la kvantoj kaj mezuroj de la pecoj; ĉiuj havis dikecon de 7mm (1/4''):

- **2 flankoj:** 3 × 10 cm (1-1/4" × 4")
- **2 finoj:** 1.5 × 5 cm (5/8" × 1-7/8")
- **Kovrilo kaj malsupro:** 5 × 10 cm (4" × 1-7/8")


La facojn mi glatigis per ŝlifpapero mezgrada, kaj poste mi kungluis la pecojn. Mi uzas lignogluon de la marko *Titebond*, sed por tiu ĉi projekto preskaŭ ajna lignogluo taŭgas.

Poste, kiam la gluo jam bone firmiĝis, mi denove glatigis la kesteton, aparte la juntojn, por ebenigi ilin ĝis la facoj. Post tio mi reglatigis la korpon per pli fajna ŝlifpapero.



Dum la lignogluo firmiĝas, la pecoj devas esti firme kuntenitaj. Ĉi tie mi uzas malgrandajn risort-krampojn kaj elastajn ringojn.

Por ĉi tiu haste farita projekto mi faris platajn juntojn; mi simple kungluis la pecojn ĉe iliaj finoj, sen enĉizi mortezojn aŭ tenonojn. Se mi havus pli da tempo aŭ lerteco, mi sendube farus kombil-juntojn aŭ hirundvostajn juntojn pro ties beleco kaj fortikeco. Tamen eĉ kun plataj juntoj, sufiĉis nur gluo por bone kunfiksi la pecojn.



Du oftaj juntospecoj. Supre: denta aŭ kombila junto; malsupre: hirundvosta junto. (Bildigis ilin la redaktoro per la senpaga programo Sketchup [<http://sketchup.com>], ege utila ilo por perkomputila fasonado de lignoprojektoj.)

Por alfiksi la kovrilon mi decidis uzi latunajn najletojn kiel pivotojn. Taŭgus ankaŭ veraj ĉarniroj – sed ilin mi ne havis, kaj la najletoj bone sufiĉis. Mi devis tamen lukti por ĝuste alfiksi ilin al la kovrilo. Mi devis dufoje rebori etajn truojn por ili, por ke la kovrilo havu ĝustan aspekton.

Se oni preferas ĉarnirojn, eble indas rekomendi lokojn por aĉeti. Oni povas trovi malgrandajn ĉarnirojn ĉe grandaj usonaj vendejoj kiel *Home Depot*, *Lowe's*, ks., sed ili kutime estas krudaspektaj kaj tial ne bone taŭgas por ornamita donacujo. Indas kontroli ankaŭ ĉe vendejoj por hobiistoj, ekz. *Michaels*, *Hobby Lobby*, *Jo-Ann Fabrics*, *AC Moore*, ks., aŭ ie ajn kie oni trovas aĵojn por

artmetiistoj.



La kesteto kaj kovrilo estas pretaj por la fina kunfikso. Oni povas vidi la naturan randon de la kovrilo. Tre eleganta, ĉu? Pro kutimo mi kontrolis la kesteton per la eta ortilo. Ĝi ne estis perfekta, tamen sufiĉe bona.

Antaŭ ol mi kunfiksas la partojn, mi finpretigis la kesteton kaj kovrilon per kelkaj tavoloj de ŝpruclako. Mi decidis ne tegi la internon per felto ĉar la vejnaro de la ligno aspektas tre bele. Mi pensis, ke verŝajne mia edzino efektive ne konservos la orelingojn en la kesteto post la donacado ĉar ĝi estas iom kruda. (Sed tamen ŝi ja faris tion!)



Daĉjo RUTAN

Daĉjo estas neprofesia lignaĵisto en nord-okcidenta Nov-Jerzejo. Li havas nur malmultekostajn ilojn, sed li faras per ili malgrandajn projektojn el ligno por si, por sia familio kaj, de tempo al tempo, por

aliuloj.

senintenca esperantaĵo?

Bordo

Ray REDD



Jen tre forta (kaj tre peza) bicikloseruro. Sed ŝajne ĝi funkcias nur apud maroj, lagoj, aŭ riveroj.

Vojaĝoj en Esperantujo

Arlyn KERR

Dum la lastaj kelkaj jaroj mi kaj mia edzo Les ŝatas vojaĝi en Esperantujo. Ni planas vojaĝojn laŭ eventoj, precipe en Eŭropo. En 2015 dum 19 semajnoj, ni ĉeestis ses eventojn: MeKaRo-n en Toronto, la skotan nacian kongreson, SES-on (Somera Esperanto-Studado) en Slovakujo, la UK en Lille, Francujo, familian semajnon en Greziljono, kaj la italan nacian kongreson.



Kelkaj el nia grupo dum la Printempa Migrado en Colmar, Francujo

Ni vizitis Herzberg-am-Harz (la Esperanto-urbon en Germanujo), uzis Pasportan Servon ses fojojn (en Anglujo, Belgujo, Germanujo, kaj Svislando), kaj tranoktis ankaŭ kun esperantistoj en Danlando, Germanujo, Belgujo, kaj Svislando kiujn ni jam konis de aliaj, pasintaj eventoj aŭ per korespondado. Unu familio en Lepsiko, kiun ni renkontis pere de Esperanto antaŭ 30 jaroj, estas kvazaŭ parto de nia propra familio. Kaj unu virinon en malgranda franca vilaĝo mi konis nur per korespondado dum 30 jaroj, sed neniam antaŭe renkontis ĝis nia ĝojplena vizito.

Ni tiel ĝuis la sperton, ke ni refoje faris ion similan en 2016 dum 10 semajnoj. Ĉi-jare ni elektis kvin eventojn: familian PSI (Printempa Semajno Internacia) en Germanujo; Printempan Migradon

en Francujo, dum kiu ni piedmarŝis ĉiutage en la montaro; la francan nacian kongreson en Marsejlo; la germanan nacian kongreson en Munkeno; kaj MeKaRo-n en Kebekio.

DOLE ESPERANTO

Les et Arlyn Kerr, deux Américains espérantistes à Dole

« Je ne serais pas à Dole aujourd'hui sans l'espéranto », confie Les Kerr. Il a rencontré Emmanuel Desbrières de Dole-Espéranto à Lille l'été dernier.

Les et Arlyn Kerr sont à la retraite. « Quand ils ne sont pas sur leur bateau dans le port de Seattle, à l'est des États-Unis, ils voyagent dans le monde en parlant l'espéranto qu'ils pratiquent depuis trente ans.

« L'espéranto enrichi ma vie »

« Les langues m'intéressent, explique Les Kerr. À l'école, j'ai étudié le français pendant neuf ans, j'ai beaucoup travaillé mais je n'y arrivais pas. Et aujourd'hui encore, j'ai des problèmes avec le français. J'ai entendu parler de l'espéranto, je l'ai étudié et ça a marché. En plus, ça a enrichi ma vie et je ne serais pas à Dole aujourd'hui sans l'espéranto. »

Les et Arlyn Kerr sont le plus souvent accueillis chez d'autres espérantistes. Ils étaient au 100^e Mondial de l'espéranto à Lille l'été dernier, c'est là, qu'ils ont rencontré Emmanuel Desbrières de Dole-Espéranto.

« Il nous a dit, précise Arlyn, si nous passions en France, de venir lui rendre visite et il a organisé ces trois jours de visites avec d'autres espérantistes. » Après Dole et Dijon, Les et Arlyn Kerr vont participer au Congrès euro-méditerranéen d'espéranto à Marseille. Leur périple et leurs rencontres alimentent leur blog.

www.esperanto.org



Arlyn et Les Kerr connaissent bien évidemment Louis Pasteur, mais pas sa maison natale. Photo Christophe MARTEL

Ni estas famaj! Jen artikolo en franca gazeto pri nia vizito.

Ĉi-jare ni ne uzis Pasportan Servon, ĉar ni jam konis multajn homojn de niaj pasintaj spertoj. (Kaj ĉi-foje Les renkontis sian 25-jaran korespondanton, en Nice, por la unua fojo!) En kelkaj kazoj, konato aranĝis por ni tranokti kun nekonatoj.

Ni ŝatas viziti Esperantajn familiojn, ĉar ni ĉiam havas interesajn konversaciojn, ni lernas kaj ridas, kaj ni spertas, kiamaniere alilandaj familioj vere vivas. Cetere, ni ofte ĝuas bongustajn manĝojn, malkovras ne-turismajn urbetojn kaj vilaĝojn, kaj ŝparas multe da mono.

Ni tre ĝojas vojaĝi per Esperanto. Fakte, vojaĝo sen Esperanta aspekto nun ŝajnas stranga al ni; io mankas.

[Ni dankas al Arlyn ankaŭ pro ŝia foto de Esperantoplatz en Munkeno, kiu aperas sur la kovrilo. —Red.]

Raportoj pri la Landa Kongreso en Miamio

Alvenis tri raportoj pri la Landa Kongreso en Miamio: leteroj de John GOODHAND kaj Carlos ORTIZ, kaj fotoj de Jordan KALILICH.

Post kvin Landaj Kongresoj por mi, mi opinias, ke tiu en Miamio estis eble la plej bona el ĉiuj! Mi scias, ke oni devis aranĝi ĝin haste, sed tio ne gravis. La urbo estis bela, la hotelo estis sekura kaj komforta, kaj la bankedo estis mirinda. Mi tre ĝuis la gastojn de Sudameriko, aparte la kubanojn. Ĉu perfekta? Ne, sed vere sufiĉe bona!

— John GOODHAND



En libro pri eŭropaj lingvoj *Lingo*, lingvoŝatanto Gaston DORREN opinias, ke Esperanto ne estas facila. Esperanto neniam venkos, laŭ li, ĉar “mankante propran ŝtaton kaj ekonomion, ĝi neniam povus esperi atingi paŝon antaŭen. Finfine, anstataŭe, la mondo paroladas angle.” Lia preferata vorto en Esperanto estas “Esperinto – iu, kiu kutimis esti esperplena, sed jam ne estas tiel. Vorto resumanta nete la humoron de plimultaj esperantistoj”. (Mia traduko el la angla eldono.)

Bedaŭrinde, li nenion rakontas pri la spirito de Esperanto, pri ĝia lingva komunumo. Ja, vivanta komunumo estas tio, kion oni povas sperti dum la landa kongreso. Ĝi permesas al parolantoj kaj lernantoj ĝui la komunuman etoson de la lingvo. Multe plaĉis al mi renkonti geamikojn kaj aliajn esperantistojn de Usono kaj aliaj landoj, babiladi Esperante, rekonfirmi propra-vide, ke ĝi estas vivanta lingvo de vivanta komunumo, kiu sin esprimas per ĝi. Dum la landa kongreso mi ĝuis aŭskulti poezion, interesajn prelegojn, ktp. Ĝi pravas, ke en Esperantujo, kontraŭe al la preferata vorto de Dorren, troviĝas esperantaj esperantistoj.

PS: Mi klarigu, ke en la libro citata Dorren ŝerceme traktas plurajn lingvojn, kaj, ke li kredas, ke la mondo bezonas iun-ajn internacian lingvon – tasko por kiu, inter aliaj, li diras, ankaŭ taŭgas Esperanto.

— Carlos ORTIZ



Nijl BLONSTEIN gitarludas.



Ismary LEZCANO GARCÍA el Kubo.



Gonzalo BERMUDEZ el Kolombio.

Vere en Esperantujo

Hanso BECKLIN

Antaŭ unu jaro, mia somera laboro tute enuigis min. Soifante, mi serĉis fontojn en mia dezerto. Unu tedan tagon, mi hazarde trovis Esperanton en la retejo de Duolingo. Trapasinte multajn lecionojn en unu tago, mi sentis min sufiĉe malsoifanta, per fonto profunda. Kun volo nekutime forta, mi decidis lerni nian lingvon kiel eble plej profunde. Mi bedaŭras, ke mi ne memoras la daton de mia esperantistiĝo. Tiam, kiam mi troviĝis en la mezo de la tedo, mi povus pripensi tiun novan lingvon. Kaj kia lingvo ĝi estas! Mi enamiĝis rapide, neantaŭvideble. Serĉante feliĉigilon por mia spirito, mi trovis fortan amon.

Post kelkaj semajnoj, mi trovis la retejon de Esperanto-USA. En retpaĝo, mi legis pri la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK). Antaŭ ol lerni pri la cetero de Esperantujo, mi forte volis partopreni en NASK en la somero de 2016. Multaj bariloj staris inter mi kaj la kursaro. Libera tempo, mono, kaj Esperanta lerteco mankis al mi. Deziro tre granda, sed ĉu mankis la forto? Eble. Dum ses monatoj mi ĉiutage studadis Duolingon kaj miajn librojn. Mi pasigis horojn da peniga laboro (se laboro estas la ĝusta vorto – lernado de Esperanto estis ĝojiga). Mi liberigis tempon, kaj kun la subteno de NASK por plentempaj studentoj, mi nuligis mian zorgon pri mono. Januare, mi aliĝis al la kurso. Tiu memdonaco donis al mi novan celon: pretiĝu plu por NASK.



Mi ellitiĝis en Ĉikago, streĉita. La frua sonoro de la vekhorloĝo anoncis al mia dormema korpo la venontan vojaĝon. En la granda flughaveno mi rigardis vizaĝojn, starigante demandojn al mi. Ĉu estas aliaj solaj vojaĝantoj, survoje al landoj nekonataj? Certe. Ĉu inter la flugantoj estas aliulo, kiu aŭdacas vojaĝi al loko por paroli lingvon malbone regitan? Ĉu aliuloj portas la verdan stelon interne, ĉu pro manko de butontruo, ĉu pro timo? En mia koro mi estas esperantisto, mi pensis, sed ĉu

mi povos montri tion al la aliaj NASK-anoj? Mensogus mi, se mi dirus al vi, kara leganto, ke mi ne timiĝis kaj en la flughaveno kaj en la aviadilo.

Finfine mi atingis la universitaton *William Peace*. Pluvegis dum mia paŝado el la bushaltejo en la urbocentro al la kampuso. Malseka, mi eniris la loĝejon. La etoso tuj montris sin al mi. Malgraŭ mia malsekeco, unu el la instruistoj varme salutis min kaj donis al mi informojn. Ŝlosiloj enmane, mi trovis mian ĉambron. Je la dek-sesa, mia samĉambrano ekaperis. Koloradano li estis, 24-aĝa kiel mi. Ni interparolis dudek minutojn antaŭ ol li diris al mi, ke tiu estas lia unua konversacio en nia lingvo. Kvankam li serĉis la ĝustan vorton kelkfoje, nia interŝanĝo estis ege agrabla. La etoso pendis en la ĉambro nebule – ju pli da konversacio, des pli da ridetoj.

Mirigis min, kiom da bonkoraj homoj vojaĝis al Esperantujo. La unuan vesperon, mi renkontis Kubaninon. Mia usona eduko strebis timigi min per ŝia ekzisto. Malgraŭ la iam malbonaj sentoj inter niaj hejmlandoj, tiam ni sentis nin bonege. Kun verdaj koroj batantaj samtempe, ni interparolis pri niaj esperoj. Ni ambaŭ esprimis dezirojn por paco, amikeco, kaj la eblo trovi veron en mondo ombrita per mensogoj. Mi sentis min pli simila al ŝi ol al la plimulto el miaj samlandanoj. Nur en Esperantujo, mi pensis. Poste, en loka trinkejo mi amikiĝis ankaŭ kun rondo da pli-malpli junaj esperantistoj. Bieroj enmane, ni parolis pri gramatiko, la movado, niaj propraj vivoj, kaj niaj esperoj por NASK. Krom mi kaj alia nova esperantisto de Novjorko, ĉiuj jam partoprenis en NASK. Ili esperis, ke la kursoj kaj instruistoj estos tiel bonaj, kiel en la pasinteco. Mi nur esperis, ke mi povus trovi la ĝustan klason.

Mia menso estis duigita. Ĉu la meza nivelo estus bona por mi? La anglo, kiu instruis ĝin, estis amuza. Certe, ankaŭ liaj rimedoj por poluri mian lingvoscion estus amuzaj. Sed la gramatikaj diskutoj promesitaj en la supera kurso logis min. Multaj NASK-anoj konsilis min tiel: “Ĉeestu la superan. Se ĝi ne taŭgos, vi povos iri al la meza.”

La unuan tagon, ni ĉiuj prezentis nin al niaj klasanoj. Subite, mi rekonis multajn nomojn kaj el la folioj de *Usona Esperantisto* kaj el Interreto. Jes! Tiu estas la bestkuracisto el Alabamo, kiu verkis rakonton pri la hundido! Tiu estas la redaktoro de la gazeto! Tiu estas la kuracisto el Vaŝingtono, kiu ofte helpis min pri gramatiko fejsbuke – sen ŝia laboro por la Duolingo-kurso, mi neniam estus eklerninta Esperanton. Pliaj nomoj sonoris en miaj oreloj kiel gravaj esperantistoj de Usono kaj la mondo. Sed neniu nomo sonoris pli laŭte ol tiu de la instruisto, Bertilo. Kiel Mikelanĝelo, li nek kaŝas la familinomon, nek ŝanĝis sian nomon al unuvorta kromnomo. Nur liaj senhaltaj laboroj nomigis lin ununome. Mi timis la grandajn nomojn. Ĉu la supera nivelo vere taŭgos?

Jes, la supera taŭgis. Fakte, la famuloj de Esperantujo estas homoj kiel vi kaj mi. Ili bone regas la lingvon, sed (kiel ni) eraras iomete. Ili ne komprenas ĉion. En la klasĉambro, eĉ ili cerbe starigis po unu demando pri “po”. Kune, ni povis analizi eĉ la plej malfacilajn gramatikajn problemojn, kaj diskuti ilin detale. Mi komprenis kaj la demandojn kaj ofte partoprenis en la afablaj diskutoj. Pli ol iam antaŭe, mi miris pri la riĉeco de nia lingvo. Mi iomete konis la esprimpovon de Esperanto, sed mi neniam spertis ĝin tiel profunde.

Mia ĝojo multobliĝis dum la kurso. Ĉiutage, ni diskutis aferojn el la “magia ĉapelo” de Bertilo. Ĝi funkcias tiel: oni demandis Bertilon per slipo enmetita en lian pajlan ĉapelon. Dum la kurso, Bertilo prenis slipojn el la ĉapelo kaj respondis al la demandoj. Kvankam la ĉapelo estis sufiĉe malprofunda, kun slipoj superfluantaj, la respondoj de Bertilo kaj la samklasanoj ĉiam profundigis mian scion. Sed ni ne nur diskutis la demandojn. Unu el niaj plej ŝatataj taskoj estis korekti erartekstojn. Kelkfoje ni serĉis plejparte gramatikajn erarojn. Sed pli ofte ni ekzercis nin en vortelekto per tekstoj sen ĉiu sepa vorto. Tiu tasko estis farinda metodo por konstati mian vortstokon. Kompreneble, ĝi ne estas tiel granda, kiel en la angla. Tamen, mi povis elekti ĝustan vorton dum la ekzerco, eĉ se ĝi ne ĉiam estis la ĝusta vorto de la originala teksto.

Certe, mi ne estis tiel sperta, kiel multaj aliaj en la supera kurso. Ofte mankis al mi la ĝusta vorto aŭ la perfektigita stilo. Sed mi partoprenis en la kurso kaj komprenis ĝin entute. Mi amikiĝis kun la aliaj partoprenantoj, ligitaj per nia amo de la lingvo. Bertilo instruis nin kaj ŝercis kun ni. Eĉ la ununoma akademiano estis afabla, scivola homo. Li vere volis aŭdi niajn lingvajn respondojn. Pro li kaj la formo de la kurso, la supera kurso estis bona elekto por homoj scivolaj pri gramatiko, vortfarado, kaj nuntempaj lingvaj demandoj. Per ĝi, mi riĉigis mian lingvoscion kaj plenigis multajn truojn survoje al plena flueco.

La klasoj ĉiam estis bonaj, amuzaj, riĉigaj. Sed la kialoj por partopreni en NASK estas pli grandaj ol la kursoj. Simple, oni povas loĝi en Esperantujo unu semajnon. Homoj eble krokodilis dum NASK, sed mi malofte aŭdis ilin paroli angle. La tagoj estis plenplenaj de prelegoj, koncertoj, metiejoj. Ĉio estis en Esperanto, kaj la gvidantoj bone regis la lingvon, eĉ la fakvortojn bezonitajn por priskribi malsimplajn ideojn.

Por mi, la plej bona etoso estis en la trinkejo kun granda rondo de esperantistoj. Ni ludis kartludojn, ŝercis, kaj rakontis historiojn verajn kaj mensogatajn. La celo ne estis ebriiĝi – fakte, multaj homoj neniam trinkis ian alkoholaĵon. Sed tio ne gravis. La biero kaj la trinkejo estis nur bagatelaj, kompare kun la sperto paroli Esperanton kun amikoj por amuzi ilin kaj amuziĝi.

Amardolĉe, la kurso finiĝis. Ni ĉiuj sopiris al niaj propraj hejmoj kaj landoj, sciante, ke la verda flanko de niaj animoj volus resti en Esperantujo. Esperanto ŝirmis min en riĉa lando, kie mi trovis pli plenan vivon, nek nur parto de mia propra kulturo, nek forlasinte ĝin. Kun amoj kaj pensoj finfine unuigitaj korlingve, mi volis resti sur la verda herbo. Sed tio ne eblis. La esperantista vivo devas esti duigita. Hejme, mi revas pri Esperantujo tiel, kiel enmigrinto revas pri la patrujo. Ĝis mia venonta vojaĝo, mi nur povas pensi, sopiri, kaj sonĝi pri tiu lingva paradizo.

Usona Esperantisto

Redaktoro / Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.